Saluton!

Bulteno de la Esperanto-Societo de Ŝikago № 7 Julio, 2010

Kara Leganto! Via jam rimarkis, ke dum la lastaj kvar jaroj agado de la E-societo fariĝis tradicie periodeca: post la januara-maja kunsidoj E-pikniko invitas membrojn kaj julian-novembran kunsidojn kronas Zamenhofa bankedo. Laŭ la sama formulo funkciis nia E-kolektivo ankaŭ ĉi jare: post interesaj diverstipaj kunvenoj kun prelegoj en la biblioteko ni denove moviĝis al la naturo (alloke, pri la unuiĝo de la homo kun la naturo substrekis V. Pajuk en sia prelego pri la slava paganismo). Espereble, renaskita antaŭ kvar jaroj tradicia E-pikniko ne forvelkos en la estonteco. Raporton pri ĉi evento kaj "ĝia historio" legu sube.

–La Redakcio

Tradicia E-pikniko

Veterprognozo por la dimanĉo de la 27an de Julio – dato de nia tradicio Esperanta pikniko, malgajigis – atendu pluvegon kun fulmotondro. Oni devas kompreni, ke samtempe tiuj ĉi du aranĝoj – pikniko kaj fulmotondro – ne povas okazi, kaj ne rajtas malhelpi unu la alian. Pro tio mi kontaktis Ĉielan Kancelarion por fari iun kompromison: ekz., estu pluvo, sed matene aŭ malfru-vespere. Finfine, ni interkonsentis la aferon. Pri la rezulto vi jam scias: de la tagmezo kaj ĝis la 7:15 pt la Kancelario ebligis al la ŝikagaj gesamideanoj ĝui la interkomunikadon sur la sino de naturo.

Je la 11:00 matene, fininte lecionon de la ukraina lingvo, mi rapidvojaĝis renkonten al Gregoro Dolgin,

Mi ĝuis la esperanto-konversaciojn kun ĉiuj partoprenantoj, inkluzive de la plej juna Davido, kiu ŝajnis kompreni ĉion, kvankam mem ankoraŭ diras nenion en iu ajn lingvo. Ho, kiel ĉarma kaj kvieta estas tiu juna knabo, kiu ne timis barbulojn/senharulojn, sed, kontraŭe, simpatie aprobis nian gajan kunestadon dum la pikniko. –*Lesj Kordylewski*

Kvankam estis varmega tago, sed kun niaj amikoj tempo pasis ege rapide. Ni havis bonan tempon kune. Ni ŝercis, parolis kiel plibonigi nian klubon, kaj kiel ni kapablas lernigi pli multajn da vortoj al bebo Davido. Davido aspektis ege konforta kaj li aŭskultis nin dum la pikniko. Li komprenis doktoron Les dum lia parolado. Ni estis ege gaja pro li kaj pasigis agrablan tagon. –*Sepideh Laal*

kiu atendis min ĉe la trajnostacio de la Blua linio. Al piknikejo ni venis preskaŭ ĝustatempe (malfruiĝis je 9 minutoj) kaj s-ro Rikardo Ekstrom jam atendis nin, salutante de-sur sia biciklo. Triopo (ne kalkulante la biciklon) signifas pri la apero de malgranda piknikuma kolektivo, ni jam posedis rostigilon, diverspecajn kolbasetojn, legomojn kaj – sperton (!) – ĉiu el ni estis en E-movado dum pli ol 20 jaroj, kio garantiis superan lingvan nivelon de interkomunikado. Sed... sed en nia rezervita budo mankis simplaj aĵoj – tablo kun benkoj. Ni trovis tri komplektojn, sed porti ilin je la distanco de duon-kilometro ne facilas. Feliĉe en arbaro aperis ŝarĝaŭto, ŝoforon de kiu ni petis pri la helpo. Senprobleme kaj senkoste li helpis, Rikardo rakontis al li pri E-o kaj mi invitis lin, finonte sian laboron, al nia tablo. Li promesis, sed ne venis. Malgraŭ tio mi volas danki s-ron Kris pro lia helpo, li ja estas vera subtenanto de la Internacia Lingvo Esperanto.

Poste ĉio fluis glate:

alvenis (per du aŭtoj!) familio de FBI-agento Roberto (vidu la foton), iom pli poste – d-ro Leszek. Mi bedaŭras (probable, ankaŭ ili bedaŭras reciproke) pro la neveno de multaj membroj, kiuj telefonis, sed me aperis. Mi volus vidi niajn gesamideanojn de Urbana-Ŝampano, ili ja havas ambician planon gastigi jaran kunvenon de Esperanto-USA, kies provludo povas esti E-renkontiĝo en Septembro, ĉu? Sukcesojn al vi, najbaroj! Kaj, ĝis la revido, Esperanta piniko, en 2011. *–Viktor Pajuk*

El Historio de Piknikumado

Antaŭ nelonge, vagante tra la Interreto, Vikipedio, mi ekvidis interesan "foton" de unu el plej unuaj "Esperantaj" piknikoj en apudurba arbaro-rezervejo. Faris ĝin (la bildon, en usona-angla la vorto "bildo" signifas ankaŭ "foto"-n) iu franco Edouard Manet en 1863. Eble, de tiu jaro ni povas verki historian de E-piknikumado en Ŝikago. *–Araneo*

NASK

Samtempe kuin nia E-pikniko komenciĝis la Nord-Amerika Somera Kursaro – trisemajna studprogramo kiu emfazas aktivan uzadon de Esperanto en interkulturaj komunikado, kompreno, kaj kunlaboro. La kursaron fondis Catherine kaj William Schulze en 1970 ĉe Sanfranciska Ŝtata Universitato (SFŜU), por pretigi instruistojn kaj plibonigi la lingvonivelon de usonaj Esperantistoj. Depost tiam pli ol 2000 studantoj el diversaj landoj jam venis al NASK por profiti gvidadon de vere internacia grupo de eminentaj instruistoj. En 1994 la urbestro de Sanfrancisko faris oficialan proklamon kiu laudis la grandan laboron de Cathy Schulze kaj priskribis la kursaron kiel modelon de altkvalita fremdlingva instruado. En 2007 NASK translokiĝis al la bela apudmara Universitato de Kalifornio ĉe Sandiego (UCSD), kie partoprenantoj profitas ne nur de la rimedoj de mondfama altlernejo, sed ankaŭ de spertaj Esperantistoj en la universitato fakultato kaj ĉirkaŭa komunumo (por plia inform vizitu retejon de Esperanto-USA).

Peto el Francio

Karaj geamikoj, mi bezonas E-helpon. Jen mia peto. Dum kultura festivalo, ni sukcesis aranĝi esperantan koncerton en mia vilaĝo, Changé. La festivalo nomiĝas "CHANGE D'AIR". Tiu nomo estas vortludo pere de la nomo de la vilaĝo, ĝi signifas "ŝanĝi aeron". Tia aranĝo ne ofte okazas en mia regiono kaj ĝi estos bona momento por konigi Esperanton. Ni klarigos ke Esperanto estas mirinda komunikilo kaj ke homoj en la tuta mondo parolas tiun lingvon, sed ĉu oni kredos nin? Ĉu oni ne pensos ke ni estas revuloj? Tial mi bezonos vian helpon por montri ke ni ne estas kelkaj sed multaj viglaj esperantistoj. Dum la koncerto mi deziras lum-jeti fotojn sur grandan muron. Fotojn de vi, geesperantistoj de la tuta mondo. Sendu al mi foton kaj mallongan frazon por saluti la spektontojn. Jen estas mia retadreso: shanghiaeron@gmail.com ~Dankegon, Paskal

Adreso:

Esperanto Societo de Ŝikago
p/a Viktoro Pajuk
8228 O'Connor Dr., # 2F
River Grove, IL 60171
(773) 344-2276
www.esperanto-chicago.org

Estraro:

Prezidanto – Viktoro Pajuk
Vicprezidanto – D-ro Les Kordylewski
Eksprezidanto – Roberto Stalzer
Sekretario – Gertrude Novak, MD
Kasisto – Karlo Gunn

MEMBROKOTIZOJ

Membro-subtenanto: $40 jare;
Familia membro: $30,
Regula: $20
Studento aŭ pensiulo: $10.

Gifts are welcome also.
Dues are needed for the routine expenses of the Society and reported on our website.

Check should be payable to the Esperanto Society of Chicago, and mailed to our Treasurer,
Charles Gunn
828 S. Ada St,
Chicago IL 60607-4105

KUNSIDOJ

Okazas kutime la kvaran mardon de ĉiu monato en:

Sulzer Regional Public Library
4455 N. Lincoln Ave., Chicago, IL
Kunvenoj komenciĝas
je 7 p.t. en la Suda
Konferenca Salono, unua etaĝo.

SEKVANTAJ KUNSIDOJ

27an de Julio – Andreo Kolganov klarigos pri "Utilkompanioj de Usono: Akvo, Elektro, Gaso"

24an de Aŭgusto – kunsido dediĉata al UK en Havano

28an de Septembro – denove pri tradukarto kaj ATA (V. Pajuk)